## Ĝorĝo kaj Ĝeraldo

## Fonetika ekzerco pri "ĝo", speciale por finnoj kaj svedoj

En Ĝenevo loĝis mezaĝaj ĝemeloj. Ĝorĝo estis ĝentila ĝentlemano, fianĉiĝinta al Ĝinjo, ĝibulino kun ruĝa vizaĝo. Je vesperiĝo ili ĝenerale sidiĝis sur seĝon ĉe heĝo en ĝardeno kaj preĝis por Ĝeraldo, ĝoja ĝigolo, kiu amuziĝadis en drinkejoj ĝis mateniĝo ĝuante ĝinon ĝis li ebriiĝis. Ilin ĝenis, ke kvankam naskiĝos neleĝa ido al li, li ne volis edziĝi, sed fuĝe vojaĝis ĝis Ĝibraltaro.

Unue lia seniluziiĝinta kunulino ĝemis plengorĝe sed poste koleriĝis kaj engaĝis krimulon, kiu sendiĝis por venĝi al li. Tiam li ĝustatempe - malsaĝe sed kuraĝe - plonĝis en la muĝan maron kaj naĝis urĝe ĝis afrika plaĝo. Tie en danĝera ĝangalo, kie troviĝis nenio manĝebla, eĉ ne oranĝoj, li vagadis ĝis li perdiĝis kaj neniam plu videbliĝis, krom en sonĝoj de la ĝemelfrato. Ĉu li fariĝis anĝelo?